# JeunEsperantO INFO

JAN-FEB 93 N°1

REVUO de la franca asocio JEFO:
4 BIS RUE DE LA CERISAIE 75004 PARIS - TEL.: (1) 42 78 68 86


## POURQUOI UN CONTINENT COMME L'EUROPE DEVRAIT-IL PARLER LA LANGUE D'UNE PETITE ILE ?




## KIAL KONTINENTO KIEL EUROPO DEVUS PAROLI LINGVON EL INSULETO ?

# Junulara Esperantista Franca Organizo

organisation de la jeunesse espérantiste française

**MEMBRES CONSEIL D'ADMINISTRATION DE JEFO - KOMITATANOJ DE JEFO**


**PRESIDENT/PREZIDANTO**
**Philippe BERIZZI**
Résidence Ph. Auguste
20, place Georges Pompidou
78300 POISSY
Tél : (1) 30.65.86.22
Minitel : BAL : 'JEFO78'

**VICE-PRESIDENT/VIC-PREZIDANTO**
**Stéphane DUPIN**
90 bis, rue Roger Salengro
94490 ORMESSON
Tél : (1) 45 94 21 95
Minitel : BAL 'JEFO94'

**VICE-PRESIDENT/VIC-PREZIDANTO**
**RESPONSABLE DE LA COMMUNICATION ET DE LA PUBLICITE/RESPONDECULO PRI KOMUNIKADO KAJ REKLAMO**
**Alain DUPOUX**
16, rue Gaston Caillavet
75015 PARIS
Tél : (1) 45 75 84 58
Fax : (1) 45 75 10 16
Minitel : BAL 'EO75'

**SECRETAIRE/SEKRETARIO**
**Laurent VIGNAUD**
25, chemin de la Brosse
49130 LES PONTS DE CE
Tél : 41 69 70 12
Minitel : BAL 'JEFO49'


espéranto
langue internationale


**VICE-SECRETAIRE/VIC-SEKRETARIINO**
**Hélène BARKOVIC** (chez SAT)
67, avenue Gambetta
75020 PARIS
Tél : (1) 42 40 94 81
Minitel : BAL 'ARBO'

**TRESORIER/KASISTO**
**Rémy COQUARD**
32, allée du Colonel Fabien
93320 LES PAVILLONS SOUS BOIS
Tél : (1) 48 49 74 16
Minitel : BAL 'KURACILO'

**VICE-TRESORIER/VIC-KASISTO**
**Christophe FERE**
13, allée du Port St Victor
91210 DRAVEIL
Tél : (1) 69 40 25 83
Pas de BAL sur Minitel

**MEMBRE DU C.A./KOMITATANO**
**Fabienne BERTHELOT**
Deenestraat 44B
NL-3028 GK ROTTERDAM
PAYS-BAS
Tél : (31) 10 437 91 72
Pas de BAL sur Minitel

**MEMBRE DU C.A./KOMITATANO**
**Bruno FLOCHON**
Chemin du Maure (vacances)
69280 SAINTE CONSORCE
Tél : 78 87 02 51
Minitel : BAL 'CITRON'
ou/aù
7, rue du Trottoir (pendant l'année scolaire)
86000 POITIERS
Tél : 49 60 86 10

**MEMBRE DU C.A./KOMITATANO**
**Olivier MOREAU**
55, rue de Mareil (vacances)
78100 ST GERMAIN EN LAYE
Tél : (1) 39 73 57 09
Minitel : BAL 'JEFO86'
ou/aù
8, rue Louis Renard
86000 POITIERS
(pendant l'année scolaire)

**MEMBRE DU C.A./KOMITATANO**
**Laurent MARIKO**
79, rue du Monument
94500 CHAMPIGNY
Pas de BAL sur Minitel

**MEMBRE DU C.A./KOMITATANO**
**Carine ROSE**
1, rue Paul Sautai
80000 AMIENS
Tél : 22 45 22 10
Minitel : BAL 'ZELDA'


**REDAKTORO DE TIU NUMERO : STEPHANE DUPIN**


Tiu-ĉi numero estis tajpita fine de decembro kaj laserprintita je 400 ekzempleroj. Por aliĝi al JEFO, plenigu kaj sendu __nian__ aliĝilon, kiu troviĝas en tiu numero.
Ne forgesu, ke JEFO dejoras ĉe la sidejo ĉiun unuan kaj trian sabatojn ĉiumonate, de la 14a horo.
Sendu viajn artikolojn antaù la 15a de februaro por la numero dua.

Ce numéro a été tapé fin décembre et tiré au laser à 400 exemplaires. Pour adhérer à JEFO, remplissez et envoyez __notre__ bulletin d'adhésion, qui se trouve dans ce numero.
N'oubliez pas que JEFO se réunit au siège tous les 1er et 3ème samedis de chaque mois.
Envoyez-nous vos articles avant le 15 février pour le n°2/93.

Siège – Sidejo
4 bis rue de la Cerisaie
75004 PARIS

## ENKONDUKO / EDITORIAL

1993 : une nouvelle année. A cette occasion, J.E.F.O. souhaite à tous ses lecteurs UNE BONNE ET HEUREUSE NOUVELLE ANNEE. Qu'elle vous apporte tout ce que vous désirez : bonheur, santé, réussite,...

1993 : une nouvelle Europe ? Oui : officiellement, depuis le 1er janvier, les frontières entre états de la Communauté Européenne ont disparu.

1993 : une Europe parfaite ? Pas encore : il reste beaucoup à faire ... ... Comment une union peut-elle être solide, si ses membres ne se comprennent qu'à moitié ? A cela, nous savons que l'Espéranto apporte une solution simple, neutre et économe en temps et énergie. Il est donc temps maintenant d'unir nos forces et de présenter à tous les citoyens européens les avantages de l'Espéranto. Une Europe jeune par les jeunes pour tous les jeunes...

1993 : nova jaro. Tiuokaze, J.E.F.O. deziras al ĉiuj siaj legantoj BONAN KAJ FELIĈAN NOVAN JARON. Ĝi alportu al vi ĉion, kion vi deziras feliĉo, sano, sukceso,...

1993 : nova Eŭropo ? Jes : oficiale, de post la 1a de Januaro, la limoj inter la ŝtatoj de la Eŭropa Komunaĵo malaperis.

1993 : perfekta Eŭropo ? Ankoraŭ ne : restas multo farenda ... ... Kiel unuiĝo povas esti fortika, se ĝiaj membroj nur duon-interkomprenas. Al tio ni scias, ke Esperanto alportas solvon simplan, neŭtralan kaj ŝpareman je tempo kaj energio. Do nun estas tempo kunigi niajn fortojn kaj prezenti al ĉiuj Eŭropanoj la avantaĝojn de Esperanto. Juna Eŭropo far la junuloj por ĉiuj junuloj...

Bonan legadon ! Bonne lecture !

**Le rédacteur**

## ENHAVO / SOMMAIRE


| | page/paĝo |
|---|---|
| Enkonduko / Editorial | 3 |
| Raporto pri la ĝenerala asembleo / Compte-rendu de l'assemblée générale | 4 |
| Diversaj informoj / Informations diverses | 7 |
| Programo 1993 de la kultura Esperanto-domo / Programme 1993 de la maison culturelle Espérantiste | 8 |
| Raporto pri Morbecque / Compte-rendu sur Morbecque | 12 |
| LIMOUX : kongreso de la federacio Langvedoko-Rusiljono / congrès de la fédération Languedoc-Roussillon | 13 |
| En Grezijono / A Grésillon | 17 |
| Pri la rimarkoj pri Grezijono / Au sujet des remarques sur Grésillon | 18 |
| Astronomio en Esperantio / Astronomie en Espérantie | 20 |
| Pasporta Servo de T.E.J.O. | 22 |
| (Ŝadokaj paĝoj) Intervjuo de RAFI / Interview de RAFI | 24 |
| Ludoj / Jeux | 26 |
| Aliĝilo / Bulletin d'adhésion | 27 |


Les articles n'engagent que leurs auteurs. Toutefois, JEFO se réserve le droit de les publier ou non. Tous droits de reproduction fidèle autorisés sous réserve d'indication de l'auteur et de la source, et sur simple information à JEFO.

## RAPORTO PRI LA ĜENERALA ASEMBLEO

Finfine okazis la ĝenerala kunveno de JEFO la 19an de decembro 1992, la unua post plena jaro da reaktivado. Kio menciindas el ĝi ? Multaj faktoj, kiuj nur povas kuraĝigi nin al plua laboro.

Komenciĝis la kunveno je la 14a horo.
Unue, ĉar kelkaj vizaĝoj ne estis konataj, ĉiu el la partoprenintoj sin prezentis. Nur junuloj, inter kiuj multaj JEFO-anoj : Hélène BARKOVIC, Philippe BERIZZI, Fabienne BERTHELOT, Bernard BOURON, Rémy COQUARD, Stéphane DUPIN, Alain DUPOUX, Christophe FERE, Bruno FLOCHON, Tony GUYOT, Didier LOISON, Jean-Jacques NOEL, Franck VALENTIN, Laurent VIGNAUD, plus aliaj interesataj junuloj : Arno, Boris, Evelyne, Hubert, Jean-Seb, Jean-Luc, Murielle, Natalja, Sacha,...

Post tia simpatia prezentado venis la seriozaj diskutoj, se tiel oni povas nomi ilin, ĉar gaja etoso (ridoj, trinkaĵoj, ...) daŭre restis dum la tuta kunsido...). Inter la multaj pritraktitaj punktoj estis: "aktivado de JEFO dum la ĵus pasinta jaro. Multaj direndaĵoj :

La sabataj kunvenoj : ili nun regule okazas la 1an kaj 3an sabatojn de ĉiu monato kaj tre kuraĝige estas konstati, ke pli kaj pli da junuloj tion scias kaj venas por partopreni.

Ĉu ni devas paroli nur en Esperanto, ĉu nur en la franca, ĉu duone-duone dum tiaj kunvenoj ? La problemo restas solvenda.

Ĉu eblus malfermi la sidejon ĉiun sabaton estonte ? Jes, kaj tiukaze pliajn ŝlosilojn JEFO mem devos posedi.

La bulteno "JEFO-Informas" : (prizorgata de Stéphane Dupin)

Ĝi ĉi-jare regule aperis kun kelkfoje aldonaĵoj (afiŝoj,...). Ne nur ĝia aspekto multe pliboniĝis (printado, enpaĝigo,...), sed ankaŭ ĝia enhavo. Ĝi estas komputore kompostata, lasere printata kaj estas antaŭvidate anstataŭigi la nuntempe uzatajn programojn por aliaj profesi-nivele. Tamen, ĉiam alvenis kelkaj kritik-leteroj pri tiu aŭ tiu alia enhavero. El la diskuto rezultis, ke neeble estas plaĉi al ĉiuj, des pli, ke la tutan laboron faras nur unu persono ! Estontece la laboro devos esti partigata inter plurajn personojn. Se ne sin proponas junuloj por helpi al la bulten-farado, ne eblos daŭre ĝin regule aperigi.

Reklamado : Dum la pasinta jaro, JEFO provis ek-reklami al junuloj, ĉu jam samideanoj, ĉu ne. Cele al tio, krom la T-ĉemizoj kaj la disketoj HyperCard (vidu sube) estis farataj afiŝo kaj propagandilo kun la sama bildo. La propagandilo nun estas korektata kaj plibonigata.

JEFO zorgis ankaŭ pri preparo de la stando ĉe salono Expolangues, partoprenado al Fête de l'Humanité kun FET lastseptembre kaj espereble okazos same por la "salon de l'étudiant".

La Minitelo : (prizorgata de Jean-Seb kaj Philippe). De post la komenco de la jaro, pli kaj pli aktivas tiu moderna komunikilo. ĉiuj Esperantistoj estas invitataj de

Jean-Seb ĉiun merkredan vesperon, sed kutime, preskaŭ ĉiuvespere videblas konektata babilema Esperantisto.

Kiel multaj aliaj Esperantistoj, la JEFO-anoj, kaj precipe la komitatanoj, uzas la Minitelon por interŝanĝi informojn multe pli rapide ol per leteroj, kaj malpli koste ol per telefono.

La nura bedaŭrinda afero estas, ke la Minitelaj inform-paĝoj ne estas regule ĝisdatigataj. Tiu manko nun estas malaperanta kaj denove eblas reklami pri la 3615 ESPERANTO.

Nuna membraro de JEFO : je la fino de tiu-ĉi jaro 1992, ĝi konsistas el cirkaŭ (*) **190** membroj (1/3 junuloj, 1/3 patronoj kaj 1/3 simpatiantoj). De post marto, la nombro da junuloj pli ol duobliĝis !!!

(*) Rimarko : ĉar la JEFO-membroj povas aliĝi ankaŭ pere de UFE, la precizan ciferon ni ne konas.

Tian grandan nombron (kompare kun ĉ. 90 membroj antaŭ duon-jaro) ni ŝuldas precipe al la "varb-kampanjo".

Enspezoj de JEFO (krom aliĝ-kotizoj) :

100 T-ĉemizoj (zorgitaj de Alain) estis mendataj kaj ili bone disvendiĝis (malgraŭ tromultkosteco laŭ kelkaj), precipe pro la belaj verda kaj nigra koloroj ! Restas kelkaj aĉeteblaj.

Ankaŭ la disketoj HyperCard MacIntosh pri prezentado de Esperanto (zorgitaj de Philippe) estis plena sukceso.

Koncerne la Pasportan Servon, la rezulto iom malpli bonas, ĉar restas ankoraŭ kelkaj ne venditaj. Tio devenas interalie de la fakto, ke ĉi-jare ĝin disvendis, kaj JEFO, kaj Jorgos en suda Francio ! Por la jaro 1993, estas antaŭvidata pli granda kunordigado inter ambaŭ.

Elspezoj de JEFO : Ili konsistas precipe el la farado kaj sendado de la bultenoj. Rimarko : por la venonta jaro altiĝis la prezo de la bultenoj KONCIZE, aĉetataj el la Germana Esperantista Junularo (GEJ).

Krome, la diskuto pritemis alian gravan punkton : pri la neklara situacio postlasita antaŭ 2 jaroj de la antaŭaj JEFO-komitatanoj ĉe la prezidanteco de Aline Boulet. Kiom ili daŭre ŝuldas al JEFO ? JEFO postulas klarigojn kaj repagon de la tuta ŝuldata mono.

Rilatoj inter JEFO kaj aliaj asocioj :

JEFO-TEJO, GEJ,... : (zorgataj de Olivier Moreau) tre bonaj estas tiuj rilatoj, kaj plua kunlaborado ja estas antaŭvidata.

JEFO-UFE : restas ankoraŭ multo farenda, por ke la komunikado efike iru inter ambaŭ asocioj. Notindas, ke la standon ĉe Expolangues pagis UFE, kaj ties preparon zorgis JEFO. Kiel devas esti la rolo de JEFO en UFE ?...JEFO denove postulas la nuligon de la hontinda 60-procenta imposto, kiun UFE deprenas. JEFO nenlam pretos cedi pri tiu punkto al UFE.

JEFO-GAE : bonaj estis kaj restas la rilatoj. La sinjoro GAE-animanto estas tre efika kaj komunika aktivulo.

JEFO-Espéranto 95, Flash Ile-de-France, Federacioj, Rok'Gazeto, SAT-Amikaro,...: tre diversaj estas la kontaktoj kaj el ili espereble rezultos daŭra bona kunlaborado.

Radio-Libertaire : komence de junio 1992 okazis elsendo pri "JEFO kaj la junulara movado". Tri JEFO-komitatanoj ĝin partoprenis. Kunagado daŭrigenda...

Elektado de la komitatanoj : ĉiuj 12 kandidatoj estis elektitaj : Hélène BARKOVIC, Philippe BERIZZI, Fabienne BERTHELOT, Rémy COQUARD, Stéphane DUPIN, Alain DUPOUX, Christophe FERE, Bruno FLOCHON, Laurent MARIKO, Olivier MOREAU, Carine ROSE, Laurent VIGNAUD.

El la ĉi-supraj estis elektata la estraro :

prezidanto : Philippe BERIZZI
vic-prezidantoj : Stéphane DUPIN, Alain DUPOUX (pri komunikado)
sekretario : Laurent VIGNAUD
vic-sekretario: Hélène BARKOVIC
kasisto : Rémy COQUARD
vic-kasisto : Christophe FERE

La diskutado pritemis ankaŭ la aprobon de la novaj statutoj kaj la vojaĝan monkompenson donotan unufojon jare al komitatanoj partoprenantaj la ĝeneralan asembleon. Temas kompreneble pri la komitatanoj el ekster Parizo. Tio celas pli grandan partoprenon de ĉiuj junuloj en la vivo de la asocio.

Je la 20a horo finiĝis la kunveno. Tamen, ne ĉiuj foriris kaj eĉ plejmulto restis por kuna manĝado en picejo. Gaja manĝado post gaja kunveno : belege kaj agrablege kaj ... tre malfrue finiĝis tiu memorebla tago. Krome, fotojn oni faris pri la ĝenerala asembleo.

Konkludo : malgraŭ daŭra manko de aktivaj junuloj por realigi ĉiujn niajn projektojn, la unua plena jaro da revivo da JEFO donis tre kontentigan rezulton, konfirmitan de la gaja etoso dum la ĝenerala kunveno. Ni devos konfirmi tion en 1993.
JEFO estas nuntempe pli forta ol neniam kaj unu el la plej potencaj junularaj esperantistaj asocioj.
Pli kaj pli alvenas junuloj kaj nun, en la Franca movado, JEFO okupas lokon pli kaj pli JUNAN kaj AKTIVAN, dezirante doni al la ne-Esperantista publiko, indan bildon pri Esperanto.

Raportis la sekretario **Laurent VIGNAUD** kun aldonoj de **la redaktoro**

----------

## Alvokoj

Se iuj junuloj deziras fariĝi junul-delegito de UEA, ili sin proponu skribante al Louise Marin, al UFE. Por pliaj informoj, ŝin kontaktu.

JEFO kuraĝigas la junulojn kandidatiĝi por fariĝi komitatanoj de UFE. Ili devas esti -aŭ se jam ne, fariĝi, membroj de UFE, kaj skribi antaŭ la 28an de februaro al la sekretariino de UFE : Claude NOURMONT, 2 om Kläppchen, L-5682 DALHEIM, LUKSEMBURGO. La kandidatoj voĉdonatos ĉe la ĝenerala asembleo de UFE, kiu okazos en Pau de la 7a ĝis la 11a de majo 1993. Skribu al UFE por aliĝi se vi deziras partopreni.

## INFORMATIONS DIVERSES/DIVERSAJ INFORMOJ

### JEFO-INFORMAS

Nous recherchons des rédacteurs pour JEFO-Informas. En effet, bien que cherchant déjà des améliorations par nous-même, le temps que nous passons à taper et à mettre en page le journal devient considérable. Plusieurs personnes peuvent nous contacter :
- quelqu'un qui ne taperait que des articles.
- quelqu'un qui possède une P.A.O. performante pour arranger la mise en page du journal.
- quelqu'un qui serait intéressé pour devenir rédacteur en chef (à terme).
- quelqu'un qui nous enverrait un compte-rendu de ce qui se passe sur le minitel (1/2 page ou 1 page maximum) pour informer les non-minitelistes.

Précision : le standard informatique que nous utilisons est le format IBM-Texte (= ASCII) sur disquette 3"1/2, 720 Ko ou 1.44 Mo. Nous lisons aussi le format IBM-Works 2, IBM-Word 4, et bientôt Wordperfect 5.1. Dans la mesure du possible, envoyez vos articles sur disquette ainsi qu'une version imprimée de vos textes pour faire apparaître les accents circonflexes ne figurant pas dans l'alphabet ASCII. La disquette vous sera retournée.
Etant donné l'abondance des textes reçus ces derniers temps, nous vous demandons d'être concis.
Enfin n'hésitez pas à envoyer au rédacteur de KONCIZE, les textes pouvant intéresser non seulement les français mais aussi les européens.
Si notre appel n'est pas entendu et si l'équipe dirigeante de JEFO n'arrive pas à trouver une solution concrète dans les mois à venir, votre revue risque de voir son rythme de parution restreint ou au pire de disparaître.

---

### La minitel-grupo 'JEFO'

Kiel ĝia nomo ne indikas, tiu grupo ne estas tiu de la membroj de JEFO. Ĝi estas malfermita grupo en kiu ĉiuj personoj povas aliĝi (kompreneble senpage !). En tiu grupo aperas ĉiuj viaj informoj.

Kial do ni ĝin kreis ? Fakte, kelkaj el niaj membroj pensis ke la novajoj en J.I. ne estas sufiĉe novaj. La celo de la JEFO-grupo estas plenumi tiun rolon.

Jen ekzemplo de mesaĝoj kiuj povontus okazi :
(La nomoj uzataj ne ekzistas krom tiu de *RAFI)
10/02/93 : mesaĝo de *DUPONT69 : "Mi ĵus aliĝis al la I.J.K. 93, kiu okazos en Bulgario. Mi intencas preni trajnon de Lyon ĝis Parizo la 5an de aŭgusto kaj poste alian de Parizo ĝis Sofio se estas unu. Ĉu aliaj Liono-loĝantoj dezirus vojaĝi kun mi ?
12/02/93 : mesaĝo de *DUCHMOLLE86 : "Ankaŭ mi iros tien, sed de Poitiers. Ĉu ni rendevuu en 'Gare de l'Est' la 5an de aŭgusto ?"
13/02/93 : mesaĝo de *DEBUTANT75 : "Je viens de recevoir JEFO-Informas avec le bulletin d'adhésion pour une rencontre en Bulgarie. Y en a t-il qui y vont ? Si oui comment faire pour payer, je n'ai rien compris ; c'était pas écrit en français."
15/02/93 : mesaĝo de *DUPONT69 : "*DUCHMOLLE, mi akceptas vian proponon."
15/02/93 nokte : mesaĝo de *RAFI : "Salut *DEBUTANT75, tu tombes bien, je passais par hasard sur le minitel. Voici les renseignements que tu demandais. Le congrès en Bulgarie est ... Pour payer, demande à *AKTIVULOJEFO qui se fera un plaisir de t'aider à remplir le bulletin d'adhésion du congrès le 1er ou le 3ème samedi de chaque mois au siège. Je reste à ta disposition pour plus de détails."
16/02/93 : mesaĝo de *TOTO78 : "Moi, je vais à l'UK, IJS puis IJK avec une interrail:qui vient avec nous? On est déjà deux. Ecrire dans ma BAL au plus vite."
25/02/93 : mesaĝo de *ĈIAM-ĈI-TIE : "Bilan des rendez-vous pour l'été :
- Lyon Perrache TGV9999 23h45 le 03 août 93 pour l'IJK contact *DUPONT69
- Paris Gare de l'Est IC799 0h02 le 04 août 93 pour l'IJK contact *DUPONT69 ou DUCHMOLLE86"

Ĉu ankaŭ vi skribos tiajn mesaĝojn ?

---

### Délégués régionaux

Nous recherchons une personne pour coordonner le travail des délégues régionaux sur la France (matériel, affiches,...). Si vous êtes intéressé, veuillez nous contacter.

## PROGRAMO 1993 DE LA KULTURA ESPERANTO-DOMO

*"VERA OAZO EN LA DEZERTO DE LA LINGVA KONFUZADO"*

Kastelo Grésillon, F-49150 BAUGE
Tél : 41 89 10 34 Pk. Nantes 1485 39 P

La senprofitcela asocio "Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj" fondita en 1951, posedas la kastelon Grésillon kun 18-hektara parko. Ĝi organizas aù gastigas
- kursojn diversgradajn,
- prelegojn diverstemajn,
- distrajojn diversspecajn,
- ekskursojn en belega regiono.

Ĝi disponigas al la restadantoj
- kurso-ĉambrojn,
- riĉan bibliotekon,
- riĉan libro-servon,
- salonojn,
- butikon,

Jam vizitis ĝin miloj da gesamideanoj.

---

### KIEL ATINGI GRESILLON ?

vagonare : Inter Le Mans kaj Saumur la buso de la Nacia Fervoja Kompanio haltas en Baugé. Petu la horaron. Anoncu la horon de via alveno ; iu atendos vin ĉe la bushaltejo.

aùtomobile : Baugé situas ĉe la kruciĝo de du gravaj vojoj : Angers-Blois (N 23 -D 766), kaj Le Mans - Saumur (N 23 - D 135). De Baugé al la kastelo Grésillon iru la vojon D 817 al Le Lude. Grésillon situas je 2 km de Baugé.

### LA VIVO EN LA ESPERANTO-DOMO

Kursoj kaj prelegoj :
matene : 9H30 - 12H00
posttagmeze : 16H30 - 19H00


Artlaborado, ripozo : 14H00 - 16H30

Distra vespero : 21H00 (La aliĝantoj pensu pri sia partopreno en la vesperaj programoj).

Manĝoj : 8H30 - 12H30 - 19H30

La biblioteko kaj la libro-servo funkcias ĉiutage dum unu horo.
La "butiko" akceptas la kaf- kaj te- amantojn ekster la kultur-aranĝoj;
La ekskursoj okazos laù la elekto de la ĉeestantoj.

PETU la programon por 1993 : Esperanto-Domo, Inform-servo, 17, rue César Franck, F-44240 LA CHAPELLE SUR ERDE.



# KULTURAJ ARANĜOJ 1993

## 1 - INTERNACIA RENKONTO DE INFANOJ

(por la infanoj, kiuj jam eklernis la lingvon)
- kursoj, promenadoj, distraĵoj.
- studo de la ĉirkaŭa naturo.
- inicado al metiaj laboroj.
- verkado de staĝ-gazeto.

Akcepto : sabaton 24-an de aprilo posttagmeze.
Fermo : sabaton 1-an de majo matene.

## 2 - INTERNACIA AMIKA RENKONTO

Nedeviga programo : kursoj, gvidata konversacio, komunaj promenadoj, distraj vesperoj
- Teatra animado antaŭvidita

Akcepto : merkredon 23-an de junio posttagmeze
Fermo : ĵaudon 8-an de julio matene

## 3 - SEMINARIO CSEH "A" - KURSOJ

gvidos Eva BONDAR
- kursoj 1-a kaj 2-a nivelaj por diverslingva ĉeestantaro
- gvidata konversacio
- distraj vesperoj

Akcepto : ĵaudon 8-an de julio posttagmeze.
Fermo : merkredon 21-an de julio matene.

## 4 - SEMINARIO CSEH "B" - KURSOJ

gvidos Eva BONDAR
- kursoj 1-a, 2-a kaj 3-a nivelaj
- gvidata konversacio
- uzado de sorobano (japana abako), paper-faldado gvidos Kimie Markarain
- distraj vesperoj

Akcepto : ĵaudon 22-an de julio posttagmeze.
Fermo : merkredon 4-an de aŭgusto matene.

## 5 - LERNU, PRAKTIKU KAJ PERFEKTIĜU

- kursoj 1-a kaj 2-a nivelaj
- unua semajno (6-11-08) : gramatiko
  Gvidos Fernand BOYET.
- dua semajno (12-18-08) : tradukado
  Gvidos Georges LAGRANGE.
- gvidata konversacio
- distraj vesperoj

Akcepto : ĵaudon 5-an de aŭgusto posttagmeze.
Fermo : merkredon 18-an de aŭgusto matene.

## 6 - POR LA INSTRUANTOJ

- pedagogia helpo
- helpiloj
- kursoj
- distraj vesperoj.

Akcepto : ĵaudon 19-an de aŭgusto posttagmeze.
Fermo : merkredon 1-an de septembro matene.

Estos eble organizi ekskursojn al la multaj regionaj vidindaĵoj laŭ la elekto de la ĉeestantoj.

Libro-bindado, korbo-farado kaj aliaj metiaj laboroj estas antaŭviditaj. Preciza programo aperos baldaŭ.

Nia libro-servo disponigos al la ĉeestantoj la necesan materialon por studi kaj lerni. Vi jam rajtas peti la katalogon.

La Fondusa Belbona Espero donas limigitan nombron da subvencioj al kelkaj gejunuloj, ne francaj, kiuj tiel rajtos partopreni studperiodojn rabatpreze.

## LA KASTELO GRÉSILLON

Kiam, en 1585, estis konstruita nobeldomo sur la bieno "Grandaj Kampoj", kiu poste ricevis la nomon Grésillon, la tiamaj posedantoj estis konataj en la regiono ĉar ili okupis gravajn postenojn.

Kiam, sur la ruinaĵoj de la 16-jarcenta nobeldomo plurfoje riparita, estis konstruita, en 1880, la kastelo Grésillon, la famo de la posedantoj ankoraŭ ne atingis tre forajn limojn. Sed ek de la fino de 1951, la nomo "Grésillon" diskonatiĝis en la tuta mondo, ĉar la kastelo estis vizitata de esperantistoj el multaj landoj, ĝis nun 57.

Kio allogis ilin ? Ĉu nur la lingvaj aktivaĵoj, lernado kaj praktikado ? Ne. De tie ili kunportis hejmen neforgeseblan memoron de vera amikeco. Jen kio skribis iu vizitintino :

"Pasos la tempo... Vi venas al mia imago, ho Grezijono, dum la vintra sezono. Dezertas la salono, kie la planko memoras ankoraŭ la paŝojn, kiuj tretis ĝin pasintsomere. Senvoĉas la piano, kiun tuŝetis la lertaj fingroj de Izabela ludanta la notojn de nokturno de Chopin. Fermitas la libro de Raymond, la soleculo, kiu ŝatis sidadon en la ombro de la tilio. Svenintas la rido de Etsuko, kies japana nomo signifas "gaja infano". Ŝi ne parolis mian lingvon, mi ne parolis la ŝian kaj tamen, dank'al Esperanto, ni interkomprenis nin tiel bone. Iun septembran matenon, eta Etsuko, vi ekflugis al via mistera Japanio. Mi konservas profunde en mi, kvazaŭ eĥon, vian ridon, kiun mi neniam forgesos."

Pasas ankoraŭ tempo... Jam vintro estas for. La junaj folioj tremetas en la aprila milda vento. La birdoj retrovis sian voĉon. De aŭroro ĝis krepusko ili prikantas la vivĝojon. Baldaŭ la ŝutroj de Grezijono malfermiĝos antaŭ printempo tute nova, naturo feste ĝojega. Tiam, kun Apollinaire, mia inter ĉiuj amata poeto, mi diras: "revenu la Paska suno...".

N. Starck

---

## PREZOJ POR 1993

Jara aliĝkotizo al la Asocio : 50FF
Aliĝo al la staĝo : po 110FF semajne. (Deviga por la pli ol 16-jaruloj.)

Ĉambro estas rezervata nur post ricevo de la aliĝkotizoj kaj de 10% de la restadkostoj. La antaŭpago estas parte repagata se rezigno de aliĝo estas sufiĉe frue anoncita.

TAGA TARIFO por unu persono ( = tranoktado kaj tri manĝoj ; ĉio entenata krom la trinkaĵoj).

| | pli ol 3 tagoj | ĝis 3 tagoj |
|---|---|---|
| unupersona ĉambro | 175 | 210 |
| ĉambro por familio(2/5 litoj)* | 150 | 185 |
| kolektiva dormejo(5/8 litoj)** | 130 | 155 |
| tendumantoj | 120 | 130 |
| infanoj ĝis la 6-a jaro | 70 | 90 |

Tag- aŭ vespermanĝo : 50

*infanoj 6/16-jaraj pagas la tarifojn "kolektiva dormejo"
**Estas akceptataj infanoj nur pli ol 12-jaraĝaj.

N.B. La taga tarifo ne estas partigebla. Foresto dum la restado ne estas repagebla. Oni rajtas ricevi malvarman manĝon por pikniko.

- anstataŭ viandon la vegetaranoj ricevas pliajn legomojn, fruktojn aŭ fromaĝon.
- la tendumantoj devas manĝi en la kastelo.
- bonvolu kunporti viajn tualet- kaj buŝ-tukojn.
- ĝis la 16-a jaraĝo necesas esti akompanata de adolto.
- bonvolu liberigi vian ĉambron je la 10-a matene la forirtagon.

skribu preslitere

## ALIĜILO

(sendota al: ESPERANTO-DOMO, 17 rue César Franck, F-44240 LA CHAPELLE SUR ERDE) kun via ĉeko.

Familia nomo :.......................................................................................
Nomo :...................................................................................Aĝo:........
Adreso :...............................................................................................
..............................................................................Tel :..............
Profesio :............................................................................................

Mi intencas alveni la....................................

matene – posttagmeze.
vagonare – aŭtomobile.

Akompanos min la jenaj familianoj :

Nomo :

Aĝo :

Bonvolu rezervi :

unupersona(j)n ĉambro(j)n
ĉambrojn por familio de .... personoj
.... lito(j)n en kolektiva ĉambro
mi tendumos

Ĉi kune mi sendas poŝt/bankĉekon de..........FF por

.. aliĝo(j) al la Asocio = 50 x ... =
.. aliĝo(j) al la staĝo = 110 x ... =

antaŭpago = .......... x 10% =

Mi intencas ĉeesti kurson :

por komencantoj,
de praktikado
por lertuloj.

NE FORGESU ALDONI POŜTMARKON AU RESPOND-KUPONON SE VI DEZIRAS RICEVI KONFIRMON DE REZERVADO. DANKON.

## RAPORTO PRI MORBECQUE

Post la belga kaj la ne-derlanda renkontoj ĉi-jare, mi partoprenis la francan, nordan renkonton en Morbecque, apud Lille. La regiona asocio organizis sperte, kaj bonvenigis nin en vilaĝeto, en konforta kaj bela, gaja komuna domo de la "Zéclé", t.e."les éclaireurs de France". La renkonto komenciĝis sabate je la 2a por finiĝi dimanĉe je la 4a. Tuj seriozeco, simpatio, kaj samtempe malplia rigoro, agrabligis la etoson tie francan kaj esperantistan.

Partoprenis ĉirkaŭ 60 esperantistoj. Triono estis komencantoj, kiuj profitis la okazon por dense praktiki la lingvon per kurso. Dank'al ili, por kaj pro ili, estis iom da krokodilado en koridoroj, tamen ĝuenda. Alia grupeto ankaŭ laboris la lingvon kun gvidantino. Mi havis la plezuron gvidi trian grupeton dimanĉe, por konversacii kaj diskuti pri la temo "propagandi aŭ ne propagandi por Esperanto". Alia grupo ĉefe babilis aŭ aŭskultis s-ron Declerq anstataŭanton de s-ro Lagrange kiu ne povis veni, pri la temo de poemoj kaj poemeco. Estis tro fake kaj altnivele por mi. Do, ĉiuj povis esperantumi laŭ sia nivelo. Vespere, krom babili, kunveni, diskuti, ni lernis pri Aŭstralio, kaj kelkaj kuraĝuloj foriris al tipa malfranca irlanda kafejo, tie etosa. Mi konatiĝis kun francoj ! Ne ridu, plejofte mi opinias ke francoj pli interesiĝas pri eksterlandaj gejunuloj ol samlandanoj ankaŭ esperantistaj. Mi vidis en Morbecque, finfine, la konatajn Katrin' kaj Pier' kaj Pascal kun du komencantinoj el Parizo, kaj Didier (N.D.L.R. : *DID), ĉarmulo el Lille kaj ankaŭ Hubert el Parizo, ĉiuj novaj JEFOanontoj. Ni ne kunvenis JEFOe ĉar mankis tro da estraranoj sed ni diskutis tre interese pri JEFO. Mi aŭdis tre bonajn kaj utilajn kritikojn de Katrin, Pier', Hubert, kiujn esperebIe JEFO praktikigos.

Do, mi estis ĝojega veturi entute 600 kilometrojn por renkonti, babili kun francaj esperantistoj. Mi iom bedaŭris ne vidi pli da gejunuloj en tiu renkonto kvankam deko da sufiĉis por surprizi la organizantojn.

Ĝis venontjare al Morbecque !

**Fabienne BERTHELOT**

**FEDERATION DU LANGUEDOC-ROUSSILLON**
**DES CENTRES CULTURELS POUR L'ESPERANTO**

*ESPERANTO-FEDERACIO DE LANGVEDOKO-RUSILJONO*

★★★★★★

# 1993a kongreso LIMOUX maje 15/16 ajn

Kongresejo: "Salle Louis COSTE"

Kongres-organizaj adresoj: -nura poŝta: ESPERANTO-KONGRESO
OFFICE de TOURISME
B.P. 5
11 303 LIMOUX (AUDE)
-telekopio: 61-67-20-25.
-telefonaj: 61-60-86-83/61-01-01-65.
-minitelo: 36 14 CHEZ * JORGOS.




+ invito al fondo-kunveno de (sendependa)

*ESPERANTO-FEDERACIO*

de M E Z N O R D A J

P I R E N E O J

+ invito al

S U D F R A N C I A

Junulara E° - Renkontiĝo

REGION MIDI PYRENEES

---

Preparata T E M O por P U B L I K A D E B A T O ...

"OKCITANIO, KATALUNIO,

LINGVO-REGIONOJ en EŬROPO"

kun esperita partopreno de fama franca lingvisto

~~Claude HAGEGE~~ ...pluserĉatas lingvo-gravulo!

Région Languedoc-Roussillon

Esperanto, une autre idée de la communication,
une haute idée de la communication...

Antaŭvidata P R O G R A M O

Ĵaŭdon k. / 9-a ĝis 12-a k. / ESPERANTO-EKSPOZICIO por baz- k.
Vendredon / 14-a ĝis 19-a: / maz-lernejoj kun
13/14-ajn / Jorgos-a libro-servo.

Ve 14-an je la 21-a: Prelegdebato pri Esperanto kaj lingvo-iniciado;
Lingvaj ludoj kaj muziko por ĉe-estaj gejunuloj.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Sabaton 15-an ek de la 8-a / A K C E P T A D O e n K O N G R E S E J O (taŭga por rulseĝoj)
B I C I K L A D O a l SAINT- B E N O I T por tie reloki E-lingvajn strato-nomajn ŝildetojn iam verkitaj de tiea E-parolanta pentristo (laŭ tuja interkonsento kun vilaĝestro).
je la 9-a: E k z a m e n - s e s i o de I L E I (laŭ ties organizemo)...

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Sabaton 15-an / ek de la 13-a / P L U A A K C E P T A D O d e K O N G R E S A N O J
je la 14-a: E K Z A M E N - S E S I O d e F r a n c a E s p e r a n t o - I n s t i t u t o (laŭ ties organizeblecoj...

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Sabaton 15-an je la 15-a

E-LINGVA P R E L E G E T O fare de eksterlandano kaj samtempe:
Franc-lingva P U B L I K A D E B A T O pri: "OCCITANIE, CATALOGNE, REGIONS LINGUISTIQUES en EUROPE" kunordigata kun Okcitanistoj kaj Katalunistoj...
...Ĉu nia sola lingvo pli facile unuigos ilin ol la madrida, pariza kaj Dante-a lingvoj plej oficiale uzataj sur iliaj teritorioj ? ...kaj donos al ili proksimon al ceteraj Eŭropanoj ? ? ?

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Sabaton 15-an / je la 18-a: S P E K T A K L E T O : S K E Ĉ O J - ĤOR
" 19-a: VESPERMANĜO nemultekosta en Mezlernejo
" 20-a30: S P E K T A K L E T O : Ĥ O R O - SKEĈOJ...

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Sabaton 15-an de la 21-a30 ĝis la 24-a (pro dormontaj najbaroj...sed / F O L K - B A L O kun A I G A R E L A, LangvedokArjeja TradiciMuzik-Grupo simpatianta Esperanton kaj bonetose danciga ĉiuaĝulojn; ricevatos E-lingva danco-gvidado de Monik'. Dancemaj nekongresanoj pagos 30 FF-ojn.
sed...de la 25-a horo ĝis ekmateno eblos ajne noktumi en...
(jes!) N O K T O - D A N C E J O kun la francie konataj " R O Z - M A R I A J B E B O J ", Alternativ-RokGrupo el TOLOSA |Tuluzo| F-kantema !

Dimanĉon / je la 9-a: Jorgos: "KIEL VIGLIGI ?" ...debato.
16-an      " 9-a30:Oficialaj Jar-kunvenoj:
- E°Federacio de LANGVEDOK-RUSILJONO;
- E°Federacio de MEZNORDAJ PIRENEOJ (Fondo-kunveno)
- SUDFRANCIA JUNULARO + JEFO.
je la 10-a30: du vigligaj/esperigaj kunvenoj:
E°F.Langv-Rus. + JUNULOJ
E°F.Mezn-Pir. + JUNULOJ
je la 11-a30: - E°F.LR pri UFE-Kongreso en 1994
- INFANOJ kaj JUNULOJ:"BICIKLE al VALENCIA".

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Dimanĉon / 12-a: REGION-TIPA FEST-MANĜO en "MAISONdelaBLANQUETTE"
16-an      14-a: VIZITO de la KELOJ de "SIEUR d'ARQUES" aŭ
PIED-MIGRADO al St-HILAIRE-ABATEJO (12Km-ojn)
aŭ St-MARTIN-PAC-MONUMENTO (7Km)
je la 15-a eblos pliaj vizitoj:
.Pentrista Muzeo kaj Preĝejoj de Mezepoka LIMOUX;
.Vilaĝeto St-BENOIT (16Km) kaj MONTBEL-LAGO(28Km)
.Zamenhof-Strato en QUILLAN(27)kVarmakva ALET(8);
.Arkeologia Muzeo en RENNES-le-CHATEAU (19Km)...

-B-O-N-V-O-L-U- -T-R-A-N-Ĉ-I- -B-O-N-V-O-L-U- -T-R-A-N-Ĉ-I- -B-O-N-V-

# ALIĜILO

RESENDOTA al "ESPERANTO-KONGRESO"
B.P.5 OFFICE de TOURISME
F - 11 303 LIMOUX.

NOMOJ.........................

ADRESOJ POŜTA.........................................
TELEFONA........... ♀ /_/ ♂ /_/ NASKIĜDATO.............

PROFESIO................. ŜATOKUPOJ...........................

Mi per ĉeko aŭ mandato pagas al poŝta ĝir-konto: JORGOS
CCP 7856 76 U LYON, por:

- Kongres-aliĝo (neniel repagota)...................._____FF
- Antaŭmendo de "BLANQUETTE de LIMOUX" kun E-etikedo...._____FF
- Antaŭmendo de lokaj poŝt-kartoj kun E-teksto(10=20FF)._____FF
- Sabata vesper-manĝo (vegetara jes/ne) je FF........_____FF
- Sabata tranoktado en unupersona ĉambro je FF........_____FF
- " " " " dormejo je FF.............._____FF
  (malpli ol 150F)
- Dimanĉa festo-manĝo en "La MAISON de la BLANQUETTE"95F_____FF
- Donaco por helpi al junulara programo............_____FF
- Donaco por helpi ĝeneralan organizadon.............._____FF

...............................................Sume: _____FF

Mi kandidatas por ekzameno ___-agrada de ______ sendante ĉi-aliĝilon antaŭ la 1-a de marto '93

Mi kandidatiĝas al la komitato de LANGVEDOK-RUSILJONA / MEZNORD-PIRENEA E-FEDERACIO

Subskribo: Dato:

DUM LA TUTA KONGRESO INFANOJ PRIZORGATOS DE PATR-IN-OJ KAJ INSTRUEMUL-IN-OJ

---

Kotiz-tabelo:
L-R-E Federacianoj
kaj E-istoj el M-P
Nefederacianoj el
Langvedok-Rusiljono

| Kotiz-Tabelo: ĝis: | 5-a februare ; | 5-a aprile ; | poste |
|---|---|---|---|
| L-R-E Federacianoj kaj E-istoj el M-P kaj cetera Francio | 40 FF-ojn | 50 FF | 70 FF |
| Nefederacianoj el LangvedokRusiljono | 50 FF-ojn | 60 FF | 80 FF |
| 13ĝis26-jaruloj k. samfamiliano de iu plenkotizulo | 30 FF-ojn | 40 FF | 60 FF |
| Infanoj ĝis 13-j. | 10 FF-ojn | 20 FF | 40 FF |

Aliĝo senpagas por nefrancianoj kaj rabateblas por helpantoj.

---

Ankoraŭ eblas okazigi pliajn aferojn ...laŭ via propono...
...Kiom restos por vesper-manĝi dimanĉon???
Lunde eblos pliaj vizitoj tra ARIEJA |ARJEĴO|, PASPORT-SERVEMA LANDO... marde, merkrede kaj ĵaŭde vi vigligos tieajn E-kursojn kaj poste povos viziti TULUZOn.

---

La VIZITO de KELOJ "SIEUR d'ARQUES" estos escepte por ni senpagaj. Prezo de 6 boteloj de "BLANQUETTE de LIMOUX" kun E-etikedo estas 210 FF-a ; temas pri bongusta ŝaŭmvino (unua en mondhistorio) el vilaĝa bieno.

---

Sekve mian aliĝon mi precizigas:
Mi antaŭmendas pliajn tranoktadojn..........................
manĝojn..........................
Mi ja/ne mendas vegetaran dimanĉan festo-manĝon. ?
Mi volonte aliĝos perpiedan migradon al......................
peraŭtan veturadon al......................
...
... ... ...

---

Se vi tiujn solvojn preferas petu informojn pri tendumejo kaj hoteloj...

## EN GREZIJONO

La aùtuna kunveno de la komitato okazis la 25an de oktobro. La plej okulfrapa konstato pri tiu kvardeka funkcijaro estis la malkresko de la nombro da staĝanoj : sed laùdire de la prezidanto, tiu situacio ne estigas danĝeron, pro tio ke Grezijono havas fleksebian strukturon, kiu ebligas adapton de la elspezoj al la enspezoj.

Post la kontentiga raporto pri la pasintaj kursoj kaj prelegoj, estis planata la programo por la venonta somero, interalie : tre kompleta staĝo pri teatro en Esperanto (malfeliĉe de la 23a ĝis la 30a de junio), Cseh-seminarioj A kaj B dum la du staĝoj de julio, gramatikaj kaj tradukaj studoj komence de aùgusto kaj instrumetoda staĝo (eble kun Stefan Mac Gill) dum la du lastaj semajnoj.

Estas memoriginde, ke ankaù okazos la Paska staĝo, de la 24a de aprilo ĝis la 1a de majo, speciale dediĉita al la infanoj kaj gejunuloj. Tre probable partoprenos hungaraj geknaboj, kiuj jam lernis Esperanton. Krom la kursoj, okazos vizitoj al la Grezijona regiono kaj studo pri la arbaro.

Konvinko mia estas, ke Grezijono estas valoraĵo en nia Movado, ke ni devas plu labori por ĝi, aù nur alporti iom el nia forto, entuziasmo kaj komunikemo, por ke ĝi plenigu niajn esperojn. Mi ŝatus, ke vi, legantoj de JEFO INFORMAS, reagu pri tiu temo : ĉu Grezijono plaĉas al vi ? Kiel vi imagas idealan Grezijonon ? Se vi neniam venis, kial ? Se vi jam venis, kiujn bonajn aù malbonajn memoraĵojn vi konservas ? Je via vico skribi nun !


**Philippe COMBOT**


# PRI LA RIMARKOJ PRI GREZIJONO...

Ĵus reveninte de unusemajna Grezijonado, mi atente legis la artikolon de Philippe Combot (J.I. n°4/92) pri nia esperantista kulturdomo. Dum mia restado tie, evidentiĝis pli kaj pli gravaj problemoj, ne plu kaŝeblaj.

Unue, mi ĝojegas, ke la estraro de Grezijono konscias pri la problemo de la naĝbaseno, kaj antaŭvidas ĝin solvi.
Sciu, ke tiu "naĝejo" estis konstruata de junaj esperantistoj, antaŭ kelkaj jardekoj. Ili fosis truon kaj ĉirkaŭigis ĝin per muroj ; la apuda lageto donis la akvon. Ekde tiam, centoj da personoj multe ĝin ĝuis.
Pasintsomere, dum tuta semajno, Pier' kaj mi decidis ĝin purigi, ĉar ĝia lasta purigado datiĝas de longe; kaj la malklara flava-verda akvo ne allogis al banado... Ni du penis sole, por formeti pli ol 100 ĉarumoj da ŝlimo, mortaj folioj, algoj kaj ranidoj...
Post unusemajna laboro, la baseno aspektis pura. Kvankam, ie tie, la muroj fendiĝis, cemento mankis, ktp... Plie, ĉar la akvo ne sufiĉis en la lageto, oni ne povis plenigi ĝin.

Ĉar funkcias tiel :



"NE ESTAS AKVO, EBLE ESTAS FIŜO"

Kiam la akvonivelo de la lageto estas kiel A, la truo de akvo trairas facile la filtrilon kaj la naĝbaseno tute pleniĝas.
Pasintsomere, la akvonivelo estis kiel B kaj la naĝbaseno nur iomete pleniĝis.
Ĉi-somere, la akvonivelo estis eĉ malpli ol kiel C ! (pro alia problemo, vidu sube).
Tamen, evidentiĝas nun, ke ne estis superflua strečata laboro, ĉar oni konsciis pri la problemo, kaj deziras ĝin solvi por rehavigi al la kastelo, belaspekteblan, uzeblan, agrablan naĝejon...

Tio ne estas la nura farendaĵo de la bieno Grezijono !
Efektive, ekzemple la ligna ponteto mortiĝas, ĝi estas malfidinda, kaj la danĝero trairi ĝin estas reala !
Same, la lageto sub la ponteto similas pli kaj pli al marĉo ! Akvo mankas, ŝlimo kaj algoj abundas...
Se vi konas la bienon Grezijono kaj ĝian ĉirkaŭaĵon, vi mirus, ke ĝuste mankas en nia lageto, kvankam la apudaj najbaraj estas senakvoproblemo !
Ĝuste, la problemo estas : la riveretoj, kiuj alportas akvon en la lageton de la kastelo, estas obstrukcitaj pro falintaj mortintaj arboj, kreskantaj bambuaroj, amasoj da ŝlimo kaj kaĉo, kiuj malhelpas la akvofluon...
Ĉi-somere, do, denove bonvoluloj provis tion plibonigi...

Philippe bedaŭrinde pravas, dirante, ke l'antaŭa spirito de kunagado kaj kunvivado malaperis, kaj ke la kulturdomo fariĝis esperantista libertempejo...
Sed tamen bonŝance, kelkaj homoj zorgas kaj agadas por ĝia bonaspekto...

Due, Philippe mencias la altajn prezojn de la restado pro la salajro de la kuiristino kaj de la helpantoj. Kial la esperantistoj ne helpus ? Eble ne ĉiuj, sed tiuj, kiuj kunlaborus, ĝuus favorajn prezojn... (En "familia domo" -feriejo, la feriantoj mem okupiĝas pri ordigo de la tabloj, pri demeto de la teleroj kaj ties purigado... kial ne en Grezijono ?)

Same por la prizorgado de la ĝardeno, arbaro, lageto, naĝbaseno, oni povus organizi bonvolularon, kies membroj pagus malpli koste sian restadon...

Mi jam tion proponis, sed oni respondis al mi senentuziasme "ne eblas pro asekuraj malfacilaĵoj... ktp". Mi do ĝojis legante, ke la estraro de Grezijono deziras efektive kaj finfine, fari kaj ŝangi aĵojn - ĉar mi iom dubis, tiam...

Ĉiukaze, por ke nia kastelo ne ruiniĝu pro nia neglekto sed male, ĉiam pli prosperu, mi bonvolas kunlabori ĉu por kuirado, zorgado de la gardeno, arbaro, refarado de ĉambroj kaj invitas ĉiujn kun sama zorgo, kiuj ŝatas amuziĝi laborante kune, kunagadi.

Kiam do oni ekkomencos ?

KATRIN'

Les articles scientifiques dans notre revue sont inexistants. Aussi pour varier un peu, allons-nous en présenter un paru récemment dans la presse non spécialisée. Peut-être certains de nos lecteurs apprendront-ils avec surprise que l'espéranto est déjà dans le cosmos...
De Heroldo de Esperanto du 16 avril 1991 :

## A. Astéroïdes "Zamenhof" et "Esperanto"

A partir de la poussière cosmique et du gaz contenant les résidus nucléaires des générations d'étoiles disparues, se constitue un nuage dense qui, ensuite, se tasse sous l'action de son propre poids et de sa rotation initiale et se transforme en un disque gigantesque. Quand la boule, au centre, est assez dense et compacte, se produit en son sein une fusion nucléaire. Une étoile apparaît.

Notre soleil aussi est une étoile semblable : un réacteur thermo-nucléaire géant, formé il y a 4,6 milliards d'années. Et, en fait, c'est une étoile très ordinaire, l'une des 100 milliards d'autres semblables, avec encore des milliards de planètes, qui ensemble constituent notre galaxie, la Voie lactée, qui n'est qu'un système stellaire parmi les millions qui constituent l'Univers.

Notre système solaire, qui se trouve à peu près au milieu entre le centre et un bord de notre galaxie est constitué par le soleil, 9 planètes tournant autour du soleil et par leurs satellites qui tournent autour d'eux.

Mais cela n'est pas tout ce qui tourne et d'autre part, le vide, dans l'univers, entre les étoiles n'existe pas. Outre les molécules de gaz entre les planètes, comme elles, des centaines de milliers d'objets célestes : poussières, grains ou corps plus volumineux, jusqu'à des diamètres de dizaines de kilomètres, donc, en définitive, des planètes miniatures, des petites planètes appelées astéroïdes. Ces fragments, particules et poussière cosmique constituent les "majestueux" et très célèbres anneaux de la planète Saturne.

Le plus grand nombre de ces objets tourne, curieusement, mais c'est un fait, dans la zone entre l'orbite de Mars et Jupiter, donc à mi-distance du soleil, à environ 550 millions de kilomètres, c'est à dire à une distance triple de celle entre le soleil et la Terre.

Evidemment, les astronomes des différents pays découvrent, observent et enregistrent dans les observatoires, au moyen de télescopes de grande qualité, les données concernant les astéroïdes. Les résultats de ces recherches sont publiés dans les revues spécialisées internationales.

C'est ainsi, qu'entre autres, sont enregistrés les deux astéroïdes connus dans la "MINOR PLANETS CIRCULAR" (circulaire concernant les astéroïdes) n°1350 du 26 janvier 1956, publiée par l'Université de Cincinnati, Ohio, Etats-Unis.

Le texte (traduit) en est :

*"(1421) ESPERANTO = 1936 F.Q. Découvert par Y. Väisälä, le 18 mars 1936 à Turku. Nommé en hommage à la langue internationale proposée par L.L. Zamenhof en 1887 pour un usage général dans les sciences. L'auteur avait utilisé le pseudonyme de Doktoro Esperanto.*

*(1462) ZAMENHOF = 1938 C.A. Découvert par Väisälä le 6 février 1938 à Turku. Nommé en hommage à L.L. Zamenhof (1859-1917), médecin polonais et auteur de la langue internationale Espéranto.*

*Le Prof. Väisälä (1891-1971) était un espérantiste finlandais éminent. Président de l'Association espérantiste internationale scientifique (I.S.A.E.). Une collaboratrice de valeur du Prof. Väisälä fut L. Oterma."*

La question suivante se pose aussitôt : quelle est la grandeur des astéroïdes "Espéranto" et "Zamenhof" ? Ce genre de mesure est toujours relatif. Par exemple est-ce que notre globe terrestre est grand ? Comparée à ses voisins Mercure et Mars, la Terre est environ deux fois plus grande. D'autre part, comparée à Jupiter, notre Terre est presque naine : Jupiter est 13 fois plus grand et 360 fois plus lourd que la Terre et 1300 globes terrestres y tiendraient à l'intérieur. La comparaison se justifie donc. On sait depuis longtemps qu'autour de Mars tournent deux satellites : Phobos et Deimos. On n'en savait pas beaucoup plus. Mais le 29 janvier 1989, l'Union Soviétique a lancé une sonde spatiale pour explorer au moyen d'instruments électroniques les plus modernes ces satellites de Mars. On sait déjà qu'ils ont la forme d'ellipsoïdes avec les dimensions suivantes selon des axes inégaux : Deimos : 10x12x16 km, Phobos : 30x23x28 km, astéroïde Zamenhof : 10x30 km, astéroïde Espéranto : 20x50 km.

Par conséquent "Espéranto" et "Zamenhof" ne sont donc pas "tout à fait insignifiants" dans l'univers. Et puisque Zamenhof était un homme modeste, soyons-le nous aussi...

**Extrait de la Revue ESPERANTO 95.** A suivre dans le prochain numéro

La sciencaj artikoloj malestas en nia revuo. Tial, por iom varii, ni tuj prezentos unu, freŝdate aperintan en la nefaka gazetaro. Eble iuj el niaj legantoj surprize ekscios, ke Eperanto estas jam en la kosmo.
Laŭ Heroldo de Esperanto je la 16a de aprilo 1991 :

A. Asteroidoj "Zamenhof" kaj "Esperanto"

Post kiam el la kosma polvo kaj gaso, entenanta la nukleo-sintriĝintajn produktojn de pasintaj stelgeneracioj, akumuliĝas nubo ĝis griza maso-denso, tiam ĝi kolapsas sub la influo de l'propra gravito, kaj pro la origina rotacio de la nubo estiĝas giganta disko. Kiam la centra materia bulo estas sufiĉe masiva, kompakta, tiam en ĝia interno ekbrulas la fajro de nuklea kunfandiĝo : estiĝas stelo.

Tia stelo estas ankaŭ nia suno : giganta termo-nuklea reaktoro, estiĝinta antaŭ 4,6 miliardoj da jaroj. Kaj konkrete, ĝi estas tute ordinara stelo, unu el 100 miliardoj da similaj aliaj kun eĉ pliaj miliardoj da planedoj, el kiuj kune konsistas nia galaksio, la Lakta Vojo, kiu estas nur unu el la multmilionoj da stelsistemoj en la tuta kosmo.

Nia sunsistemo troviĝanta iel meze inter la centro kaj la rando de tiu nia galaksio, konsistas el la suno, el 9 planedoj, cirkulantaj ĉirkaŭ la suno kaj el ties lunoj, cirkulantaj ĉirkaŭ siaj planedoj.

Sed tio ne estas ĉio, kio cirkulas kaj cetere, vakuo en la kosmo inter la steloj ne ekzistas. Krom gasmolekuloj inter planedoj, same kiel ili, centmiloj da "ĉielaj objektoj" : polvaĵaj, grajnecaj, miniatur-planedoj, planedetoj, t.n. asteroidoj. El tiaj pecoj, eroj kaj kosma polvo cetere konsistas la "majestaj", fame konataj ringoj de l'planedo Saturno.

La plej multaj el tiuj objektoj cirkulas, strange sed fakte, en la zono inter la orbito de la planedoj Marso kaj Jupitero, do en meza distanco de l'suno je ĉ. 550 milionoj da km, t.e. la triobla distanco inter suno kaj tero.

Kompreneble, la astronomoj diversnaciaj malkovras, observas kaj registras en la observatorioj per altkvalitaj teleskopoj la datumojn de tiuj asteroidoj. La rezultoj de tiuj studoj estas publikataj en internaciaj fakaj ĵurnaloj.

Tiamaniere i.a. estas registritaj la du nomitaj asteroidoj en "MINOR PLANETS CIRCULAR" (Asteroida cirkulero) n°1350 de la 26a de januaro 1956, eldonita de la Universitato en Cincinnati, Ohio, Usono.

La teksto (tradukita) estas :

*" (1421) ESPERANTO = 1936 F.Q. Malkovrita fare de Y. Väisälä la 18an de marto 1936 en Turku. Nomita omaĝe al la internacia lingvo proponita de L.L. Zamenhof en 1887 por ĝenerala scienca uzado. La aŭtoro uzis la pseŭdonimon Doktoro Esperanto.*

*(1462) ZAMENHOF = 1938 C.A. Malkovrita fare de Väisälä la 6an de februaro 1938 en Turku. Nomita honore al L.L. Zamenhof (1859-1917), pola kuracisto kaj aŭtoro de la internacia lingvo Esperanto".*

*Profesoro Väisälä (1891-1971) estis elstara finna esperantisto, Prezidanto de l'Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.). Grava kunlaborantino de Prof. Väisälä estis L. Oterma".*

Leviĝas ja nun la demando : kiom grandaj estas tiuj asteroidoj "Esperanto" kaj "Zamenhof". Nu tiaj mezuroj ja estas ĉiam relativaj. Ekz. : ĉu nia terglobo estas granda ? Kompare al siaj najbaraj Merkuro kaj Marso, la Tero estas ĉ. duoble pli granda. Aliflanke kompare al Jupitero, nia Tero estas kvazaŭ nano : Jupitero estas 13-oble pli granda kaj 360-oble pli peza ol la Tero, kaj 1300 terigloboj havus spacon en ĝi. Do praviĝas komparo. Delonge estas konate, ke ĉirkaŭ la planedo Marso cirkulas du lunoj, nomitaj Fobos kaj Dejmos. Multe pli oni ne sciis pri ili. Sed la 29an de januaro 1989, Sovetunio lanĉis spacsondilon por esplori per plej modernaj elektronikaj instrumentoj ĝuste tiujn trabantojn de l'Marso. Jam estas konate, ke ili havas la formon de elipsoidoj kun jenaj mezuroj en malsamaj aksoj : Luno Dejmos : 10x12x16 km, Luno Fobos : 30x23x28 km, asteroido Zamenhof : 10x30 km, asteroido Esperanto : 20x 50 km.

Do, tute ne sensignifaj ankaŭ en la kosmo "Esperanto" kaj "Zamenhof" estas. Kaj ĉar Zamenhof ja estis modesta homo, ankaŭ ni estu tiaj...

***En multaj el niaj informiloj pri Esperanto, la listo "Pasporta Servo" estas la plej bona pruvilo, ke Esperanto junas kaj utilas en la mondo de hodiaŭ.***

---

**HELPU al ni atingi, ke la reto de adresoj en la eldono de 1993 estu ANKORAŬ PLI DENSA KAJ AMPLEKSA! Helpu al ni superi la nombron de 1.000 gastigantoj! Alportu al via ĉambro iom da aldona internacieco: ALIĜU AL NIA RONDO KAJ FARIĜU GASTIGANTO DE**

**PASPORTA SERVO !**

PASPORTA SERVO



(c) tejo ĉe gej tp 10 · 92

LA LISTO DE GASTIGANTOJ DE
TEJO

# Aliĝilo

## por la Pasporta Servo de TEJO

ne plenigu

Se vi pretas senpage gastigi Esperanto-parolantojn, plenigu tiun ĉi folion kaj sendu ĝin ĝis la 1a de decembro al:




**Pasporta Servo de TEJO**
Rob Keetlaer
Postbus 2310
NL-1000 CH Amsterdam
Nederlando




Skribu maŝine, aŭ almenaŭ presliterel Ne esperantigu vian adreson!
Skribu per latinaj aŭ cirilaj literoj.

Lando: ______________________________

Urbo: ______________________________
sub kiu vi estu listigata

Nomoj: ______________________________
laŭ via kutima sinsekvo; nur la familian nomon majuskligu

Mi estas: Viro / Virino Naskiĝjaro: __________

Adreso: ______________________________
laŭ la kutima vialanda sinsekvo, nepre ne esperantigu

Telefona numero enlanda: ______________________________

Mia urbo situas ____ km norde / sude / okcidente / oriente de __________

Mi ofertas SENPAGAN gastigon al ESPERANTO-PAROLANTOJ laŭ jenaj kondiĉoj:

Nombro da gastoj: __________ Nombro da tagoj: __________

Necesas: SKRIBA PETO / TELEFONA PETO / NENIA ANTAŬA ANONCO

Aliaj kondiĉoj aŭ precizigoj: ______________________________

______________________________

Dato: __________ Subskribo: ______________________________

______________________________

TOUT CE QUE VOUS AVEZ TOUJOURS VOULU SAVOIR

SUR R A F I

SANS JAMAIS OSER LE DEMANDER

Un palpitant et grand reportage exclusif de notre envoyé spécial tout juste rentré de Pologne, notre célèbre, talentueux et prometteur OLIVIER MOREAU.

Je tiu tempo, pli kaj pli oftiĝis Rafi tra la paĝoj de Jefo-Informas, ankaŭ sur la minitelo. Bone mi, Olivier Moreau, estis informata danke al la ricevo de nia revuo JI kaj l'afableco de kelkaj francaj Jefanoj. Ĉu hazarde, ĉu intence, mi, kiu tiam restadis en Pollando, ricevis verdire strangan kaj mirigan leteron. Iu anonimulo, kiu plie ne subskribis sian leteron, proponis al mi specialajn informojn pri Rafi, tiu estulo (homo, besto ?), jam bone konata kaj amata de iuj, malamata de aliuj. Fine mi povis konstati, ke skribis la leteron Rafi mem. Li propone rendevuis min en Bjalistoko antaŭ la giganta 50-metra statuo de nia dia majtro Sankta Ludoviko, proksiman dimanĉon je la 15a. Ĉar tiun tagon mi ne laboras krom por Esperanto, mi decidis iri.

Je la dirita tago staris mi en la indikita loko. Mi mensostreĉe demandis min, kiu kaj kio okazos baldaŭege. Jen post unu minuto aperis, mi ne scias kiel, iu / io kaj ekkriis:


"ESTU LAŬDATA SANKTA LUDOVIKO !!!"

Stranga estulo staris antaŭ miaj okuloj, nigre vestita per longa mantelo kun same nigra ĉapelo kaj ĝi aspektis kvazaŭ birdo. Mi tuj rekonis ĝian batalkrion laŭdire multege uzatan, kiam ĝin oni renkontas perminitele.

"Rafi, saluton, mi diris.
- Olivier, fiku bone !"
Jen alia minitela kutimo, kiu simple signifas "Bonan sanon !"
"Ŝajnas, ke vi konas mian nomon, ĉu ?
- Mia sekreta polico estas inter la plej efikaj. Jen tasko mia scii kiel eble plej multe pri multaj.
- Ĉu vi konsentus respondi kelkajn demandojn por la legantaro de Jefo-Informas ?
- Nu ĝuste pro tio vin mi rendevuis. Estas do normale, ke nun mi iĝu por ili pli konata.
- Do ni faru. Rafi, malfacila demando: ĉu vi estas ino aŭ malino ?
- Verdire, ĉu gravas ? Mi povus respondi, ke la specio de Rafi-oj ne posedas sekson. Pro tio ĝi emas sed ne amas malaperi. Sed fakte mi ne diros ĉar mi estas tio, kion vi volas ĉar certe nur la spirito gravas kaj ne la materio.
- Ĉu junulo aŭ maljunulo, Rafi ?
- Dank mia dia majstro mi estas senaĝa, senepoka. Efektive la spirito de Zamenhof blovas super mi.

- Eterna senaĝulo saĝulo sed ne eterna komencanto, mi esperas.
- Ja mi estas komencanto. Mi ne plu estos, kiam mi neniam plu havos por lerni, kiam mi plene regos Esperanton, tiel estas neniam.
- Kia estas via celo en Esperantio ?
- Esperantigi la ŝadokojn, ŝadokigi la esperantistojn. Kaj esperantumi. Kiel iam diris Ĵak Le Puil, "Ŝadokoj ĉiulande unuiĝu !" Pli serioze mi deziras plene kaj rajte povi uzi mian lingvon en mia patrio, praktiki mian kulturon en mia mibera lando, agnoskigi mian esperantan identecon.
- Vi do povas plene feliĉe vivi en Esperantio...
- Bedaŭrinde ne tre. Mi estas serĉata kaj persekutata de multuloj pro mia iama kritikegemo kontraŭ Moŝtoj de la movado. Kaj ŝanĝiĝi mi ne povas. Kiel jam diris la minitelanto Vampyr: "Surtout ne change pas; des Rafi, on n'en fait plus."
Jen do mia problemo: kiel ŝanĝi miajn rilatojn kun la Moŝtoj sen ŝanĝiĝi se ne per ilia ŝanĝo ? Pro tio mi estas kondamnata vagi tra Esperantio ĝis la fino de mia viv'. Ho ve ! Sed atestu, ke tamen mi amas ilin ĉiujn. Ĝis !
- Sed Rafi, mi volis..."

Senefike ! Tiam precize malaperis la stranga Rafi forflugante tra la aero. Mi neniam plu vidis ĝin, sed daŭre alvenis ĝiaj artikoloj al nia revuo.
Nu, faru al mi plezuron, mi petas. Se iam poste eble antaŭ la statuo de Zamenhof, vi vidas iun strangan nigran birdon, informu min, ke li revenis. Mi feliĉos.



Olivier Moreau, intervjuinto de

RAFI.








# distra angelo



Frohe Weihnachten und ein gutes neues Jahr · Feliz Navidad Próspero Año Nuevo · Buon Natale Felice Anno Nuovo · Prettige Kerstdagen Gelukkig Nieuwjaar

## KRUCVORTENIGMO

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | | | | | |
| 2 | | | F | | | | | | | |
| 3 | | | | E | | | | | | |
| 4 | | J | | | L | | | | | |
| 5 | | | A | | | I | | | | |
| 6 | | | | R | | | Č | | | |
| 7 | | | | | O | | | A | | |
| 8 | | | | | | N | | | N | |
| 9 | | | | | | | | | | |
| 10 | | | | | | | | | | |

HORIZONTALE – 1 foresto de koloroj (r) - participfinaĵo. 2 sin deteni de nutraĵo - vesto (r). 3 neutila insekto krustulo. 4 tirola kanto (r) - komika sceneto (r). 5 ĝui provizore ion kontraŭ pago (r) - surfaco (r) - nedifinita adjektivo - provizora ĝuo kontraŭ pago. 6 numeralo - metalenhava mineralo (r) - sufikso - sufikso. 7 dorsomalformaĵo - norda monero (r) - liternomo. 8 plumtufo (r) - rifuza - nomo (fonetike). 9 maljesi - regula movado - sufikso. 10 spirita percepto - mikroskopa fungeto (r) - internacia prefikso.

VERTIKALE – 1 arbo - malhelpi. 2 preskaŭ flui - malagrable piketi - multekosta ŝtono (r). 3 iom da afableco - patriarko - konfuzata de trinkado. 4 banantranĉaĵo - geometria solido (r) - unuo de laboro (r). 5 neakompaneteco - nedefinita pronomo. 6 spirita atmosfero (r) - nedefinita adjektivo - abstraktaĵo (r). 7 malbonodora insekto (r) - farunmanĝaĵo (r) - irigi boaton. 8 el kosta metalo - prepozicio - malgranda - koro de homo. 9 malnova lumiglilo (r) - iom utila - stulta modadmiranto (r). 10 certigo por ricevi "La Informilo"n dismigi en pluraj pecoj.

## SILABENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj vorteroj, malkovru la vortojn, aiel sed ne aliel ili ne troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformos proverbon

ad ak an be bo eg el em en ero et ev go ia io kva lo lo lo mo mo no oo od olo op or ori po po po ra ra ro ror ru se si sl smo ste ta ta te to to to to tu van vi vra

| | | |
|---|---|---|
| 1 | + - - + - - - | homaro |
| 2 | + - - + - | malofta |
| 3 | + - - + - - | donaceto |
| 4 | + - - + - - - - | mortonto |
| 5 | + - - + - - - | lirika poemo |
| 6 | + - - + - | germana regiono |
| 7 | + - - + - - - | aervesiketo |
| 8 | + - - + - - - - - | favora okazo |
| 9 | + - - + - - | supernuba ĉielo |
| 10 | + - - + - - | tertremo |
| 11 | + - - + - - - | japana mato |
| 12 | + - - + - - - - - | banale tradicia |
| 13 | + - - + - - - - | aro el ses voĉoj |
| 14 | + - - + - - - | konvencia lingvo |
| 15 | + - - + - - | kompatinda |
| 16 | + - - + - - - | difinita okazaĵo |
| 17 | + - - + - - - - - | balenoptero |
| 18 | + - - + - - - | simbola protektantaĵo |
| 19 | + - - + - - | influi flarsenson |



# ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANCAISE

**JeunESPERANTO**

J.E.F.O. - JeunESPERANTO
4 bis rue de la Cerisaie
75004 PARIS
Minitel : 3615 ESPERANTO (Groupe JEFO)

.
S.
E.

**BULLETIN D'ADHESION 1992 / 1993** (l'adhésion s'entend toujc… sur l'année scolaire allant du 1er octobre au 30 septembre suivant…

Nom : ______________ Prénom : ______________

Adresse : ______________

Code postal : ______ Ville : ______________

Sexe : ___ Téléphone : ________ Professior… ______________

Date de naissance : .. / .. / 19.. (jour / mo… année)

OFFRE SPECIALE : demi-cotisation ==> adhésion possible à JEFO pour 6 mois
date limite : 01/03/1993

Reportez les nombres dans les cases "membr… …lues :

| | Prix (F) | Membre | Code |
|---|---|---|---|
| **ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE …AISE (J.E.F.O.)** | | | |
| **Membre actif JEFO** (moins de 30 ans au …/10/92) a le droit de vote pour le comité de … et reçoit JEFO-INFORMAS (France) et KONCIZE (…) : | | | |
| * Cotisation normale | 120 | | JSM |
| * Etudiant, chômeur, scolai… …litaire (service national) | 75 | | JMM |
| **Membre bienfaiteur JEFO** (plus … ans) reçoit JEFO-INFORMAS (France … …ONCIZE (Europe) | 120 | | JPM |
| **Membre sympathisant JEFO** (… …e 30 ans) soutient l'association, m… … reçoit pas les revues | 30 | | JSP |
| **Don à JEFO** (à votre ini… …e) | | | |
| **ORGANISATION MONDIALE … JEUNESSE ESPERANTISTE (T.E.J.O.)** | | | |
| **Membre moins de 30** … …vec l'annuaire (JARLIBRO) et les revues KON… …et TEJO-TUTMONDE | 110 | | MJT |
| **Membre moins de** … …s avec l'annuaire (JARLIBRO) et les revues … …TO, TEJO-TUTMONDE et ESPERANTO | 275 | | MAT |
| **Membre bienf…** **TEJO** (plus de 30 ans) reçoit KONT… …t TEJO-TUTMONDE | 330 | | PTM |
| …OTAL : ................................ | | | |

**PAIEMENT**


Chèqu… …al ou bancaire à l'ordre de J.E.F.O. (C.C.P. 31 709 94 Y LA SOUR… à joindre OBLIGATOIREMENT avec ce bulletin d'adhésion à : J.E.F.O., 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 PARIS

# JeunEsperantO INFO

JANV-FEV 93 N°1

**MAGAZINE de l'association JEFO:**
4 BIS RUE DE LA CERISAIE 75004 PARIS - TEL.: (1) 42 78 68 86

3615 ESPERANTO




1993!

***bienvenue en EUROPE, pays de l'ESPERANTO.***
***bonvenon en EUROPO, lando de ESPERANTO.***